



SCIENCA
VORTPROVIZO

Antaŭparolo

Mi esperante skribas sciencajn artikolojn antaŭ 10 jaroj. Multfoje mi konstatis ke mankas enciklopediojn aŭ vortaron pri sciencaj fakoj. Ofte, oni malfacile trovas vortojn disigitajn el diversaj fontoj, ĉu vortaro.net, ĉu reta-vortaro.be, eventoj.hu ĉu vikipedio ĉu diversaj fakaj libroj malhaveblaj aŭ aĉetindaj.

Plie, oni ofte renkontas dilemon kiam ekzistas plurajn vortojn neoficialajn. Kiel elekti ? Mi imagis tiun vortaron por respondi al ĉiutaga demando de fakaj verkistoj. Ĝi arigas la vortojn kion oni trovis skribante niajn artikolojn por la blogo de ISAE en diversaj disigitaj fontoj. Oni ĉiam donas la fonton. Tamen certaj vortoj estas en pluraj fontoj, tiam oni citis nur unu fonto po vorto. Tial oni prioritare citis la fonton oficialan, t.e, vortaro.net (PIV), poste, la fakaj fontoj (libroj, vortaroj, aliaj artikoloj, KTP) kaj fine la aliaj fontoj (vikipedio, reta-vortaro, ktp). Finfine, kiam oni ne trovis la trafan vorton, oni proponis nian solvon, tiam la fonto estas ISAE.

Tiu vortprovizo scienca celas helpi la fakajn verkantojn. Ni esperas ke ĝi utilis kaj, kial ne, ke dank'al ĝi oni helpas la internacian lingvon en ĝia kvesto de aktualiĝo.

La prezidanto de ISAE

Anthony LUCAS

Ordigi laŭ Alfabeto

Abelo	<i>Bee</i>	(Apis) de insektoj el la ordo de himenopteroj, kiuj produktas mielon k vakson: abelo zumas; kiu havas abelojn, havas mielonZ (ofico ebligas profitojn); ili pelis vin tiel, kiel faras la abelojX; virabelo, abelino, abelreĝino		PIV
Adipoĉelo	<i>Adipocyte</i>	Specialiĝinta ĉelo de grasa histo	grasoĉelo	PIV
ADL	<i>HDL</i>	AltDensaj Lipoproteinoj		Teleskopo
Anelidoj	<i>Annelids</i>	estas filumo de vermoj en kiu la surfaco de la korpo montras pli-malpli distingitajn dividojn en ringoj aŭ segmentoj, ĝenerale havantaj affiksaĵojn por movado kaj brankojn. En ĝi estas, inter aliaj, la ordinara tervermo, la lumbriko kaj la hirudo.	ringvermoj	Vikipedio
Arkeano		La unua tempodividaĵo de antaŭkambrio, iam taksita kiel periodo.		PIV
Arkeo		Laŭ legendo, re prilaborita en la Biblio, la ŝipo konstruita de Noa, por savi el la diluvo sian familion k ĉiujn specojn de bestoj.		PIV
Astrobiologio	<i>Astrobiology</i>	estas la spekulativa kampo de biologio en kiu oni konsideras la eblon, kaj eblan karakteron de ekstertera vivo	kosmobiologio/ eksterbiologio/e kzobiologio	Vikipedio
Astroblemo		Spuraro lasita de meteorkolizio		ISAE
Azteko		Ano de indiana popolo, kiu loĝis en Meksiko.		PIV
Bekbaleno		Familio de la subordo de la dentocetacoj. Tiuj delfenoj longas je 5 ĝis 10 metroj. Ili mangxas kalamarojn kaj kapablas resti en plonĝado dum 2 horoj.	Zifidoj	Balenoj , delfenoj kaj aliaj mirindaĵo de l'ocanoj. La Blanchetière. Marie-Christine Body & André Cherpillod
Berardiuso		Genro de la familio de la bekbalenoj (Zifidoj). <i>Berardius</i> sp. Estas nur tri specioj en tiu genro.		ISAE
Berardiuso de Baird		<i>Berardius bairdii</i> . Delfenoj el familio de la Zifidoj vivantas en la nordpacifiko, la japana maro, Oĥotska maro, Beringa Maro kaj ĝis sudo de Kalifornia Duoninsulo		ISAE
Berardiuso de Anoux		<i>Berardius arnuxii</i> . Iomete pli eta ol Berardiuso de Baird, ofta en la Suda Oceano, Ili ĉeesto estas ĉirkaŭpolusa.		ISAE

Bioto		estas la aro de ĉiuj organismoj aŭ vivuloj el geografia regiono aŭ tempa vivularo periodo , ekde lokaj geografiaj kaj momentaj skaloj ĝis tutmondaj kaj tre longdaŭraj skaloj.	Vikipedio
Bizono	<i>Bison</i>	G. (Bison) de grandaj remaĉantaj parhufaj bovedoj, vivantaj en N Ameriko k Eŭropo Amerika bizono (B. bison), Eŭropa bizono (B. bonasus). 🐃 bovo, bubalo, uro.	PIV
Bizono amerika	<i>American Bison</i>	La Amerika bizono (<i>Bison bison</i>) estas boveda mamulo, kiu estas la plej granda terbesto de Nordameriko kaj unu el la plej grandaj bovospecioj de la mondo.	Vikipedio
Bizono europa	<i>European Bison</i>	La eŭropa bizono (<i>Bison bonasus</i>), estas boveda mamulo, kiu vivas en Eŭropo, nuntempe plejparte nur en Pollando kaj Belorusio, pli ekzakte en la praarbaro de Bialowieza. Ĝi estas simila al la amerika bizono, kun kiu ĝi estas krucigebla. Kelkfoje oni traktas ilin unu specio.	Vikipedio
Bizono de Higgs	<i>Higgs Bison</i>	Prabizono. Specio da bizono kiu aperis per la hibridado de la Bizono de stepoj kaj la uro. Ĝi evoluadis por estiĝi eŭropa bizono. Ĝi malaperis	ISAE
Bizono de stepoj	<i>Steppe Bison</i>	Prabizono kiu evoluis por estiĝi Bizono Amerika. Ĝi malaperis dum kvaternaro	ISAE
BMP		(Bone morphogenic protein) [Osta Morfogenezza proteino], estas faktoro el la familio de keskigaj faktoroj el tipo TGF Beta	OMP ISAE
Epigenetiko	<i>Epigenetic</i>	Branĉo de biologio, kiu studas kiel bioĥemiaj kaj mediaj kondiĉoj rezultigas el samaj genoj diversajn ĉelojn, fenotipojn, karakterojn de vivuloj	reta-vortaro.net
Citokino	<i>Citokine</i>	estas larĝa tipo de etaj proteinoj kiuj gravas por ĉela signalado	ISAE
Dua Kemitaksisa liganto	<i>Chemokine (C-C motif) ligand 2 (CCL2)</i>	estas eta citokino kiu varbas monocitojn, T-ĉeloj kaj dendritaj ĉeloj en inflama histo	ISAE
Stromatolito		Kalkopetra konstruaĵo, devenanta el biokemia aktivado de cianobakterioj, konata de antaŭkambrio ĝis nuno.	PIV
Gametogenezo		Estiĝo, formiĝo de gametoj	ISAE
Geoido		Surfaco difinita per la samgravitaj punktoj de Tero respondaj al la meza marnivelo	PIV
Gondvano		Granda kontinento, ekzistinta de karbonio ĝis triaso sur la S duonglobo, nun disigita en pluraj pecoj (S-Ameriko, Afriko, Madagaskaro, Antarkto, Hindio k Aŭstralio).	PIV

Grelino	<i>Ghrelin</i>	Homono sekreciita de la stomako por regulo de la sato	ISAE
Hiperfagio		La tromanĝado ne regebla de la individuo.	Esperana-angla medecina terminaro. Yamazoe Saburro
Holoceno		La dua k lasta parto de kvaternaro. ➡ pleistoceno.	PIV
Homedoj	Hominidae	estas senkostaj simioj aŭ, pli precize, familio de la ordo primatoj	PIV

Hipokolesterolemio		Estas ĉeesto de tro malalta koncentriteco de kolesterolo en la sango	Esperanta-Angla Medecina terminaro de Yamazoe Saburoo, 2006. Pollando
Korpomasa Indico (KMI)	<i>Body mass index</i>	estas mezurnombro por taksi la homan korpopezon en kilogramoj rilate al la kvadrato de la alto en metroj.	ISAE
Florataj militoj		Batalo inter Aztekoj kaj la trupoje de Tlaxcala aŭ alia urbo de la valo de Puebla. Estis tre kodigita kaj ritigita batalo por kapto de ofertuloj al Dioj.	ISAE
FSH		FolikloStimulanta Hormono	ISAE
Hadeana		Plej malnova eono de la geologiaj tempoj, de la naskiĝo de Tero ĝis arkeano.	PIV
IĈAM		InterĈela Adheriga Molekulo	ISAE
Iskemio		Loka sangomanko. konsekvence loka oksigenomanko en histo	PIV
Kaĉaloto		(Physeter catodon) de dentohava cetaco kun grandega, kvarangula kapo, en kiu troviĝas la spermaceto	PIV
Kemiokino	<i>Chemokines</i>	Familio el etaj citokinoj sekretitaj de ĉeloj. Ili induktas kemitaksison	ISAE
Kemitaksiso	<i>Chemotaxis</i>	signifas movon direktitan de kemia stimulo	Vikipedio
Kladogeneza arbo		aŭ Evolua arbo estas arboforma skemo montranta la filogenezon, tio estas la parenceco inter grupoj, ofte specioj, kiuj havas kunan prapatron	Evolua arbo Vikipedio
Kronika obstrukca pneŭmonopatio		estas kronika malsano de la pulmo, karakterizata de ŝtopiĝo (obstrukco) de la bronkoj limiganta la spiran aerfluon.	Vikipedio
Lepro		Infekta malsano, kaŭzata de la bacilo de Hansen (<i>Mycobacterium leprae</i>) k karakterizata jen de haŭtaj aŭ mukozaj nodetoj, jen de makula erupcio, jen de diversaj nervaj perturboj kun atrofio k gangreno: de la Mezepoko lepro praktike plu ne ekzistas en Eŭropo; ĝi ankoraŭ troviĝas en Azio, Sud-Ameriko k Egiptujo.	PIV
Laŭrazio		Granda kontinento, ekzistinta dum la malfrua paleozoiko sur la N duonglobo, nun disigita en N-Ameriko (kun Gronlando), Eŭropo k Azio (sen Hindio 1).	PIV
Lipoproteino	<i>lipoprotein</i>		PIV

Makrofago-Koloniostimulanta Faktoro	<i>M-CSF</i>	Makrofago-Koloniostimulanta Faktoro estas sekretata citokino kiu instigas la diferenciĝon de la Stamĉeloj al Makrofagoj aŭ aliaj specifaj ĉeltipoj	M-KSF	
M-KSF	<i>M-CSF</i>	Makrofago-Koloniostimulanta Faktoro estas sekretata citokino kiu instigas la diferenciĝon de la Stamĉeloj al Makrofagoj aŭ aliaj specifaj ĉeltipoj	Makrofago-Koloniostimulanta Faktoro	ISAE
Mejozo		Tuto de la du sinsekvaj dividiĝoj de duploida nukleo, el kiu rezultas disiĝo de la homologaj kromosomoj (dum la unua dividiĝo) k estiĝo de 4 unuploidaj nukleoj: la gametoj de la plurĉelaj animaloj formiĝas post mejozo.		PIV
Mitokondrio		Organeto de la eŭkariotaj ĉeloj, kun duobla membrano k interna DNA, grave rolanta en la ĉela spirado.		PIV
MDL	<i>LDL</i>	Maldensaj lipoproteino		Teleskopo
Molekula filogenezo		Estas la uzado de sekvencoj de biologiaj makromolekuloj por akiri informojn pri la evolua historio de la vivantaĵoj kaj aparte iliaj parencecoj (filogenezo)		ISAE
Molekula horloĝo		estas tekniko en molekula evoluo kiu uzas fosiliajn limigojn kaj indicojn de molekula ŝanĝo por dedukti la tempon en geologia historio kiam du specioj aŭ aliaj taksonoj diverĝis		Vikipedio
Osta morfogeneza proteino		(Bone morphogenic protein) [Osta Morfogeneza proteino], estas faktoro el la familio de keskigaj faktoroj el tipo TGF Beta	BMP	ISAE
Ovolo		Matura, fekundigebla insekca ĉelo, produktata de ovario: ĉe vivonaskaj animaloj, i.a. mamuloj, la fekundigita ovolo iĝas ovo, kiu mem disvolviĝas al feto; ĉe ovonaskaj animaloj, la ovolo, fekundigita aŭ ne, ellasite ekster la patrino, estas nomata ovo		PIV
Paruo		Birdo (Parus k parencaj g-oj) el la ordo de paseroformaj, malgranda, tre vigla, kun mallonga beko, manĝanta insektojn k grajnoj de greno	Fringo, Fringelo, pasero	PIV
TEĈAM	<i>PECAM</i>	Trombocito-Endotelia Ĉelo Adheriga Molekulo (Anglalingve : PECAM)		ISAE
Pleistoceno		La unua parto de kvaternaro. ☞ holoceno.		PIV
Plutono		Planedo, la naŭa ekde Suno, trans Neptuno.		PIV
PM20D1 (peptidase M20 domain containing S)		Peptidazo M20 enhavanta S-lokon (EC 6.3.5.5)		ISAE

pneŭmonopatio		Kn de la pulmaj malsanoj.		PIV
Purigaj Receptoroj		Purigaj Receptoroj aŭ Scavenger receptors estas grupo da receptorok kiuj rekonas kaj kaptas MDLojn oksiditajn aŭ acetilitajn		ISAE
Retinoikan acidon		estas sennitrogena, nesaturita alkoholo, kiu estiĝas el karotenoj (fandopunkto 63-64 Co). Ĝi necesas por la kresko de la bestoj, bonstato de la epidermaj histoj kaj la estiĝo de la rodopsino. Deponiĝas en la hepato.	Vitamina A, retinolo	Vikipedio
Ribosomo		Enĉela, submikroskopa grajneto, konsistanta el ribonuklea acido (RNA) k proteino, ĉe kiu okazas la sintezo de proteinoj.		PIV
Sakarozo		La ordinara sukero (disakarido, C12H22O11), kiun oni ekstraktas el sukerkano (oficina sakaro) aŭ sukerbeto. Sin. sukrozo.		PIV
Sciuro		G. (Sciurus) de mamuloj el la ordo de ronĝuloj, kun dika, hirthara vosto, kiun ili sidante tenas rekta post la dorso, vivantaj sur arboj k manĝantaj i.a. nuksojn: ŝi sidis kiel timeganta sciuretoZ.		PIV
Sindromo de Prader-Willi		estas sindromo kies simptomoj estas denaska severa hipotonio, hiperfagio kaŭzanta mordidan obezecon. Tiu orfa patoloigo estas kaŭzita de mutacio sur la kromosomo 15		ISAE
Spermaceto		Oleosimila maso, troviĝanta en la kapo de kaĉaloto		PIV
Spermatido		Nematura virseksa ĉelo, unuploida, devenanta el spermocito k evoluanta al spermatozoo.		PIV
Spermatogenezo		Estiĝo k disvolviĝo de virseksaj ĉeloj.		PIV
Stamĉeloj	<i>Stem Cells</i>	estas korpaj ĉeloj, kiuj ankoraŭ ne estas diferencitaj	praĉelo	Vikipedio
Sterolo		Steroido kun alkohola grupo: la steroloj estas ĉefaj komponantoj de la ĉelmembranoj, de pluraj hormonoj k vitaminoj.		PIV
Sukrozo		Sakarozo.		PIV
Tetiso		estis oceano en la geologia erao de mezozoiko. La nomo venas el la helena mitologio, kie Tetiso estas la fratino kaj edzino de la titano Okeano.	Tetismaro	Vikipedio
TMDL	<i>VLDL</i>	Tre Maldensaj lipoproteinoj		Teleskopo
Toksino		okso de vivulo (precipe de mikroboj), kapabla kaŭzi gravan aŭ eĉ mortigan malsanon.		PIV
Unuploida		ĉelo enhavas el ĉiu kromosomo unu kopiaĵon.		Vikipedio

VĈAM

VCAM

Vaskulĉelaj Adherigaj Molekuloj (Anglalingve : VCAM)

ISAE

Zifidoj

Familio de la subordo de la dentocetacoj. Tiuj delfenoj longas je 5 gxis 10 metroj. Ili manĝas kalamarojn kaj kapblas resti en plonĝado dum 2 horoj.

Bekbaleno

Balenoj , delfenoj kaj aliaj mirindajxo de l'ocanoj. La Blanchetière.
Marie-Christine Body & André Cherpillod